

PROTOKOLO

pri la kunveno de la Komitato de TEJO en Castione della Presolana (Italio)

dimanĉo kaj lundo, la 16-a kaj la 17-a de aprilo 2017

protokolita kaj kompilita de Ĝenerala Sekretario de TEJO Arina Osipova

PARTOPRENINTOJ

Estraro

1. Michael Boris Mandirola (Prezidanto)
2. Arina Osipova (Ĝenerala Sekretario)
3. Enric Baltasar (Estrarano)

Ne ĉeestis:

1. Cédric Marchal (Kasisto)
2. Juliana Evandro (Vicprezidanto)

Komitato

17 komitatanoj A

1 komitatano Ĉ (vidu suplementon 1)

Volontuloj

1. Alessandro Bonfanti (ĉeestis partatempe)
2. Feriel Djenidi (ĉeestis partatempe)
3. Pierre Vittet (ĉeestis partatempe)

1. MALFERMO

Oleksandra Kovyazina (Saša Murr), la kunsidestro, malfermis la kunsidon de la Komitato je la 21:20 (20 minutoj post la planita komenco).

2. EVENTUALA ELEKTO DE PREZIDANTO DE LA KOMITATO

Kunsidestro de la Kunsido estis elektita antaŭe. La 31an de marto 2017 finiĝis reta voĉdono, kie la Komitato de TEJO aprobis, ke ŝi estu kunsidestro por la komitatkunsido. La voĉdonon partoprenis 21 komitatanoj, el kiuj 16 jesis pri la propono.

3. ELEKTO DE VOĈDONA KAJ PROPONA KOMISIONOJ

3.1. Elektro de voĉdona komisiono

Kiel membroj de la voĉdona komisiono estis proponitaj komitatano A de ĈEJ Vít Guiglielmo Mišurec kaj komitatano A de HEJ Veronika Venislovas. Komitatano de GEJ Charlotte Larson petas rakonti pri la taskoj. La TEJO-prezidanto diras pri la taskoj. Post tio la Komitato akceptas la kandidatojn.

3.2. Elektro de propona komisiono

Kiel membroj de la propona komisiono estis proponitaj komitatano A de GEJ Charlotte Larsson kaj komitatano Ĉ Joop Kieft. Antaŭ akcepti la proponon Charlotte demandas, kio tio estas kaj kiujn taskojn havas la komisiono. La Komitato akceptis la kandidatojn,

3.3. Kontrolo de la kvorumo

Saŝa petas la voĉdonan komisionon kontroli la kvorumon. Ŝi memorigas pri artikolo 2 “Komitatanoj” en Ĝenerala Reglamente de TEJO. Laŭ la punkto 2.1. Komitatano kaj kandidato por komitataneco devas esti individua membro de TEJO. La Estraro kontrolis la membrecon de la komitatanoj antaŭ la kunveno. Komitatano A de JEA Adrián Alejandro, anstataŭita de Tomáš Stano (SKEJ), ne estas individua membro 2017 por TEJO, sekve li perdas la komitatanecon. Iom poste venis mesaĝo de Juliana Evandro, ke BEJO havas nun novan komitatano A - José Querino de Macêdo Neto. Preskaŭ tuj sekve venas la mesaĝo de la nova komitatano al la Ĝenerala sekretario, ke pro lia neĉeesto Alexandre Raymond estu anstataŭanto de BEJO.

Entute estas 28 komitatanoj de TEJO (20 Komitatanoj A, 0 Komitatanoj B, 0 Komitatanoj C, 3 Komitatanoj Ĉ, 5 Estraranoj). Konsekvence la kvorumo estas 10 ĉeestantoj.

La kunsidon partoprenis 21 komitatanoj (17 Komitatanoj A, 0 Komitatanoj B, 0 Komitatanoj C, 1 Komitatanoj Ĉ, 3 Estraranoj). La kvorumo estas atingita.

Komitatano A de BEMI Carlos Pesquera Alonso havas du demandojn:

1. Pri ebleco rete partopreni la Kunvenon, kial tio ne estis organizita.

La Ĝenerala Sekretario respondas, ke tiu temo jam estis iom preparolita en la Komitata retlisto, kiam Francesco Maurelli, komitatano Ĉ, esprimis sian deziron rete partopreni la

Kunvenon. Bedaŭrinde la retkonekto dum IJF ne ĉiam estas stabila, kio malebligas plenumi la peton de teknika flanko. Malgraŭ antaŭ la Kunsido TEJO-oficisto Michal “KuboF Hromoslav” Matúšov provis solvi la problemon, sed ne estis pozitiva rezulto.

La TEJO-prezidanto aldonas, ke “Partopreno” en decido signifas en kunveno, ĉeeston de komitatano konfirmitan per subskribo. Argumenteblas ke ekzistas elektronika subskribo sed necesus atente pristudi la situacion por interpreti retan ĉeeston.

2. Kial ne eblis prepari fiksan liston de la partoprenantoj.

La Ĝenerala Sekretario klarigas, ke laŭ la Komitata Reglamenteo “La Ĝenerala Sekretario devas ricevi nomumon de anstataŭanto plej malfrue dum la unua sesio de la kunveno”.

La komitatano de BEMI opinias, ke estus pli bone ŝanĝi tion kaj doni pli fruan limdaton por anonci pri sia partopreno. La kunsidestro proponas poste fari amendon pri tiu regulo kaj ne diskuti nun.

4. FIKSO DE CETERA TAGORDO

La kunsidestro prezentas la tagordon (*vidu suplementon 2*).

La Komitato voĉdonas pri la akcepto de la tagordo. Unuanime la tagordo estas akceptita.

Saŝa legas la tagordon, ĉar pro teknikaj kialoj ne eblis ĝin prezenti per projekciilo aŭ printi.

5. RACIIGI LA ESTRARANECAN PERIODON AL LA VIVO DE JUNULOJ

5.1. Prezento kaj diskuto de la propono

Ĉar tiun ĉi temon proponis TEJO-prezidanto Michael Boris Mandirola kaj estrarano de TEJO Enric Baltasar, Saŝa petas prezenti la proponon. Por la prezentado ili havas 5 minutojn.

Enric Baltasar klarigas, ke ofte homoj ne povas plani sian vivon por 2 jaroj, tial foje estas malfacile dum du jaroj esti estrarano kaj plenumi sian rolon. Krome homoj havas projektojn por pluraj jaroj, tial indas havi tian estraron, kiu kapablos transdoni tiun informon por posteuloj. Se estrarano ne havus tempon zorgi pri la projekto dum du jaroj, posteulo havus pli da malfacilaĵoj dum la laboro.

Michael Boris aldonas, ke en multaj internaciaj junularaj organizoj estas unujara mandato, ekzemple AEGEE kaj BEST. Tio helpas al kontinuo de la agado. Okazas, ke estraranoj demisiias, ĉar du jaroj estas tre longa periodo por labori kaj en ĉiuj lastaj mandatoj estis tiaj

homoj, kiuj malmulte laboris kaj ne havis tempon por la organizo, tamen la situacioj ne estis sufiĉe ekstremaj por ke oni demisiu.

La Komitato havas tempon por demandoj.

Komitatano de BEMI estas kontraŭ tiun ĉi propono, ĉar la organizo dediĉas multe da tempo por elekti novajn homojn. Kiam oni akceptas esti estrarano, oni konsciu pri tiu dujara laboro, oni estu respondecaj kaj sciu, kiam oni amuziĝu kaj kiam estu seriozaj.

Alexandre Raymond, komitatano por EUROKKA kaj membro de la elekta komisiono, poras la proponon. Multaj landaj sekcioj havas ĝuste unu jaron por estraranado. Jes, estas multe da laboro por elekti novajn estraranojn, sed samtempe estas ŝparado de homfortoj, kio pli gravas. Kaj homoj tiukaze estu pli flekseblaj.

Anstataŭanto de komitatano A por NEJ Rogier Huurman pliĝustigas, ĉu tiu regulo funkcius ekde IJK en Togolando. Estas jesa respond'.

Saša Murr rimarkigas, ke tiukaze prezidanto povas esti nur du jarojn. Michael Boris kapjesas kaj konfirmas, ke temas pri sama posteno nur du mandatojn. Cetere tio estas fiksita Statute (*vidu suplemeton 3*) sed ankaŭ aliaj estraraj postenoj estos limigitaj je du mandatoj (do du jaroj) de la Ĝenerala Reglamento.

Alexandre Raymond vidas avantaĝojn kaj malavantaĝojn de tiu propono. La demando estas, kiom tio bonus por longdaŭraj projektoj.

Michael Boris klarigas, ke eventuale oni povus interŝanĝi kiel prezidanto kaj vicprezidanto. Do eblus ŝanĝi rolojn kaj ne eliri de la estraro.

Komitatano A de Hungario Veronika Venislovas havas demandon pri financoj ĉi-teme. Ne tre klaras, kiel raportos kasisto, se elektado de novaj estraranoj okazas somere kaj financa raporto devas prezenti plenan kalendaran jaron. Ĉu tio signifas, ke post finiĝo de la mandato povas veni nova kasisto kaj finfari la financon raporton de la antaŭa respondeculo?

Alexandre Raymond proponas ŝanĝi kalendaran jaron al mandatojaro.

Rogier Huurman kontraŭas, ĉar antaŭe dume oni neniam sukcesis prezenti dum IJK financon raporton.

Enric Baltasar revenas al la rimarko de Carlos Pesquera Alonso, klarigante, ke tempoperdo pro serĉado de novaj kandidatoj al la Estraro povas neokazi, ĉar funkcias Elekta komisiono. Kaj ĝuste la elekta komisiono havas la funkcion serĉi homojn por la sekva estraro.

La Kunsidestro limigas la tempon kaj donas ankoraŭ nur 5 minutojn por diskutado.

Charlotte Larsson, komitatano de GEJ konsilas pli atenti pri kasisto. Laŭ ŝi bonus havi nur unu jaron, sed financoj ne estas nur laboro de kasisto. Kion faros Estraro, kiam kasisto komencas labori pri financa raporto sed ne finos pro alveno de nova mandato?

La Ĝenerala Sekretario rimarkigas, ke ankaŭ tio rilatas al Jarraporto, ke diversaj homoj verkos ĝin.

5.2. Voĉdono pri la propono

La Kunsidestro proponas voĉdoni. La Propona komisiono prezentas la vortumon: *La komitato akceptas la proponitan amendon por la Ĝenerala Reglamento de TEJO al ĉapitro 7. Estraranoj, punkto 3, en kiu la "malpara jaro" ŝanĝiĝas al "ĉiu jaro" kaj ŝanĝiĝas la mencio pri la okazo de la ĉefa kunveno en "la sekvanta malpara jaro" al "la sekvanta jaro", forigante la vorton "malpara".*

Carlos Pesquera Alonso petas klarigon, kial oni parolas pri estraranoj, ne pri Estraro. Michael Boris Mandirola respondas, ke la Komitatano elektas ĉiujn estraranojn aparte.

Rezultoj de la voĉdono:

Jes 15

Ne 6

Sindetenis 0

La amendo estas akceptita.

6. ALIAJ REGLAMENTAJ ŜANĜOJ

Michael Boris Mandirola havas proceduran proponon, ke ĉiuj amendoj estu traktitaj unu post la alia. La Komitato konsentas.

Carlos Pesquera Alonso demandas, ĉu eblos aldoni novajn amendojn aŭ akcepteblas nur tiuj, kiuj estas prezentitaj nun.

Rogier Huurman certigas, ke ĉiu rajtas proponi amendojn, ĉar TEJO-Komitato estas supera organo.

6.1. Amendo pri punkto 4, ĉapitro 2. Komitatanoj de la Ĝenerala Reglamento de TEJO

6.1.1. Prezentado kaj diskuto de la propono

Komitatano kiu nek partoprenas 2 sinsekvajn retajn voĉdonojn nek komitatkunsidon (senanstataŭe) ene de la mandato estas konsiderata kiel demisiinta.

Michael Boris Mandirola klarigas, ke la amendo estis proponita por eviti miskomprenojn pri la vorto "sinsekva". Li proponas, ke sinsekvaj voĉdonoj estu tiuj, kiuj ne finiĝas en la sama tago. Bedaŭrinde, la voĉdonsistemo ne estas perfekta, tial ne eblas (almenaŭ dume) komenci novajn kelkajn voĉdonojn samsekunde, tial okazas, ke novaj voĉdonoj aperas en la sama tago.

Carlos Pesquera Alonso proponas, ke sinsekva voĉdonu estu tia, kiu finiĝas en la sama semajno.

Charlotte Larsson petas tiukaze aldoni, kio estas semajno, laŭ kiu sistemo ni kalkulos.

Rogier Huurman rekomendas uzi sistemon de lundkomenco.

Michael Boris Mandirola proponas voĉdoni. Komence okazos voĉdono pri la nuna amendo. Se la propono estus malakceptita, la Propona komisiono revertumus la amendon laŭ la ideo de Carlos.

6.1.2. Voĉdono pri la amendo

La propona komisiono prezentas la vortumon: *La komitato akceptas la proponitan amendon al ĉapitro 2, komitatanoj, kiu renumerigas punkton 5 al punkto 6, aldonante kiel punkto 5 la frazon "Oni ne konsideras kiel sinsekvajn voĉdonojn tiujn, kiuj finiĝas en la sama tago laŭ la nederlanda horzono".*

Rezultoj de la voĉdono:

Jes 19

Ne 0

Sindetenis 2

La amendo estas akceptita.

6.2. Amendo pri la artikoloj de la Komitata Reglamente

6.2.1. Prezento kaj diskuto de la propono

Michael Boris proponas forigi artikolon 11. Komisionoj kaj artikolon 12. Interpretado de la Komitata Reglamente kaj aldoni ilin al la Ĝenerala Reglamente de TEJO. La Prezidanto klarigas, ke la komisionoj ne estas nur komisionoj de la komitato, sed de la organizo. Tial estus pli logike transmeti la punkton al alia Reglamente.

Neniu el la komitatanoj havas opinion pri tiu Ĉi amendo.

6.2.2. Voĉdono pri la amendo

Propona komisiono legas la vortumon: *Meti artikolon 11. Komisionoj kaj artikolon 12. Interpretado de la Komitata Reglamento al la Ĝenerala Reglamento de TEJO.*

Rezultoj de la voĉdono:

Jes 20

Ne 0

Sindetenis 1

La amendo estas akceptita.

6.3. Amendo pri la artikolo 12. Interpretado

6.3.1. Amendo pri la punkto 1 de la ĉapitro 12. Interpretado

6.3.1.1. Prezento kaj diskuto de la propono

Emanuele Regano, komitatano de IEJ proponas ŝanĝi la ordon de la dokumentoj en la punkto 1, ke nun estu: *Pri malklaraĵoj aŭ nekonsideritaj aferoj validas laŭvice la nederlanda juro, la Statuto, la Regularo pri Kunlaboro de UEA kaj TEJO, la Ĝenerala Reglamento kaj la aliaj reglamentoj.*

TEJO-Volontulo Alessandro Bonfanti demandas, kion signifas “laŭvice”. Ĉu to signifas, ke la unua estas pli grava ol la postaj.

Michael Boris klarigas, ke estas ordo de supera al malpli supera dokumento.

6.3.1.2. Voĉdono pri la amendo

La Propona komisiono prezentas la vortumon: *La komitato akceptas ŝanĝi la unuan punkton de la ĉapitro 12, Interpretado, al "Pri malklaraĵoj aŭ nekonsideritaj aferoj validas laŭvice la nederlanda juro, la Statuto, la Regularo pri Kunlaboro de UEA kaj TEJO, la Ĝenerala Reglamento kaj la aliaj reglamentoj."*

Rezulto de la voĉdono:

Jes 20

Ne 0

Sindetenis 1

La amendo estas aprobita.

6.3.2. Amendo pri la punkto 2 de la ĉapitro 12. Interpretado

6.3.2.1. Prezento kaj diskuto de la propono

La propono estas:

ŝanĝi *Neniu en la Reglamento povas kontraŭi la Regularon.*

al *Neniu dokumento povas kontraŭi supervalidan dokumenton.*

Charlotte Larsson proponas aldoni “plivalidajn dokumentojn kiuj estas menciitaj en punkto 1” por eviti miskomprenojn.

Rogier Huurman ne tiom ŝatas la vorton “plivalidaj”, ĉar ĉiuj dokumentoj estas validaj.

6.3.2.2. Voĉdono pri la amendon

La Propona komisiono prezentas la vortumon: *La komitato akceptas ŝanĝi la duan punkton de la ĉapitro 12, Interpretado, al "Neniu dokumento povas kontraŭi supervalidajn dokumentojn laŭ la vico menciita en punkto 1."*

Rezultoj de la voĉdono:

Jes 20

Ne 0

Sindetenis 1

La amendo estas akceptita.

6.3.3. Amendo pri la punkto 3 de la ĉapitro 12. Interpretado

6.3.3.1. Prezento kaj diskuto pri la amendo

La propono estas:

ŝanĝi *La Komitato povas modifi la Reglamenton per decido de plejmulto.*

al *La Komitato povas modifi la Reglamentojn per decido de plejmulto de la voĉdonantoj*

Alexandre Raymond ne komprenas, kiu ŝanĝo okazis en tiu ĉi punkto.

Michael Boris klarigas, ke nun estas reglamentoj, ĉar la Organizo havas plurajn reglamentojn

Carlos Pesquera Alonso proponas aldoni al la amendo “Reglamentoj de TEJO”

6.3.3.2. Voĉdono pri la amendo

La Propona komisiono prezentas la vortumon: *La komitato akceptas ŝanĝi la trian punkton de la ĉapitro 12, Interpretado, al "La Komitato povas modifi la Reglamentojn de TEJO per plejmulto de la voĉoj."*

Rezultoj de la voĉdono:

Jes 19

Ne 0

Sindetenis 2

La amendo estas akceptita.

6.3.4. Amendo pri la punkto 4 de la ĉapitro 12. Interpretado

6.3.4.1. Prezento kaj diskuto pri la amendo

La propono estas: aldoni nova punkton al tiu ĉapitro: *Pri interpretaj klarigoj de la supraj juraj fontoj oni apelaciu al la Ĝenerala Sekretario de TEJO kiu respondecas pri la interpretado.*

La Komitato ne havas komentojn pri tiu ĉi amendo.

6.3.4.2. Voĉdono pri la amendo

La Propono komisiono prezentas la vortumon: *La komitato akceptas aldoni al ĉapitro 12, Interpretado, kvaran punkton kiu diras "Pri interpretaj klarigoj de la supraj juraj fontoj oni apelaciu al la Ĝenerala Sekretario de TEJO, kiu respondecas pri la interpretado."*

Rezultoj de la voĉdono:

Jes 19

Ne 1

Sindetenis 1

La amendo estas akceptita.

6.4. Amendo pri la Reglamento pri komitatanoj C

La amendoj venas de IEJ.

Michael Boris Mandirola havas proceduran proponon – voĉdoni kune la amendojn.

6.4.1. Prezento kaj diskuto pri la amendo

Komitatano A de IEJ Emanuele Regano proponas en la Punktoj 7. 8 amendi la proponon ŝanĝante *juna amikaro* al *junaj amikoj*.

La TEJO-prezidanto klarigas ke la celo de la amendo estas postuli aproban voĉdonon kaze je ununura kandidato.

Carlos Pesquera Alonso demandas, ĉu juna amiko bezonas esti membro de TEJO.

Michael Boris Mandirola klarigas, ke Junaj Amikoj de Esperanto estas mem membrokategorio sed la Komitatano C devos esti individua membroj.

6.4.2. Voĉdono pri la amendo

La Propona komisiono prezentas la amendon: *La komitato akceptas el la Reglamento pri komitatanoj C en la punkto 5 forigi la komencon de la frazo "Se estas pli ol unu kandidato", al punkto 7 aldoni post "estas elektita" la frazon "En okazo de ununura kandidato, tiu devas ricevi almenaŭ duonon de la esprimataj voĉoj.", kaj en punkto 7 kaj 8 ŝanĝi la vortojn Juna Amikaro al Junaj Amikoj.*

Rezultoj de la voĉdono:

Jes 18

Ne 1

Sindetenis 2

La amendo estas akceptita.

7. JURA MEMSTARIĜO

7.1. Prezento de la nuna stato de tiu ĉi temo

TEJO-Prezidanto ĝisdatigas, ke en julio okazis voĉdono pri Nova Statuto de TEJO kiu estis aprobita. La Komitatoj de TEJO kaj UEA aprobis ĝin. Tamen estis malkongruo kun la Statuto de UEA, kiu asertis ke TEJO estas integra parto de UEA. La komitato de UEA, kaj poste la membraro de UEA per poŝta voĉdono, amendis la Statuton de UEA kaj akceptis la juran memstariĝon de TEJO, kiu tamen restas junulara sekcio de UEA.

TEJO bezonas havi notarian plenumon por ke la Statuto povu esti registrita de la komerca ĉambro kaj agnoskita de eksteraj instancoj.

La Ĝenerala Direktoro estis taskita pri la notaria plenumo sed ĝis mezo de novembro 2016 la Estraro ne ricevis enhavan reeĥon de Ĝenerala Direktoro pri tio. Do tiam pri la temo estis taskita Joop Kiefte, kiu dum tiu tempo estis TEJO-oficisto, tamen estis malsukceso. Ekde la komenco de 2017 okazis reprovo kun la Ĝenerala Direktoro kaj meze de marto ni ricevis malneton pri la plenumakto. La notario petis al la Ĝenerala Direktoro protokolon de la pasinta Komitata kunsido, kiu okazis dum IJK 2016. Laŭ la notario en la protokolo ne estas klare skribite, ke TEJO mandatas al notario plenumi la Statuton. Tial nun endas havi klaran decidon, ke la Organizo konsentas pri notaria plenumo.

Michael Boris Mandirola petas, ke Joop Kiefte, nuna komitatano Ĉ, legu la vortumon en la nederlanda kun posta traduko:

De ledenraad beslist dat de nieuwe statuten om TEJO juridisch zelfstandig te maken in akte moeten worden vastgelegd en bij de KvK gedeponereerd moet worden, en dat TEJO bij de KvK geregistreerd moet worden als vereniging met volledige rechtspersoonlijkheid.

[La komitato decidas, ke la nova statuto, kiu faru TEJO-n jure memstara, estu registrita en akto kaj deponita ĉe la nederlanda komerca ĉambro, kaj ke TEJO estu registrita ĉe la nederlanda komerca ĉambro kiel asocio kun plena jura personeco.]

Enric Baltasar pliĝustigas, ke TEJO tamen estas jam registrita.

Michael Boris Mandirola klarigas ke jes, ĝi estas registrita, tamen kun limigita jura personeco, ne kun plena.

7.2. Voĉdono pri la vortumo al la notario

Rezultoj de la voĉdono:

Jes 20

Ne 1

Sindetenis 0

La propono estas akceptita.

8. JARRAPORTO

8.1. Diskuto pri la Jarraporto

Charlotte Larsson indikas pri mistajpoj, kiuj estas en la dokumento. La Ĝenerala Sekretario petas listitgi ĉiujn mistajpojn kaj sendi tiun informon retroŝte por ĉio estu korektita.

Komitatano A de ĈEJ Vít Guiglielmo Mišurec petas, ke en la Jarraporto estu uzitaj plenaj nomoj (ekz. neplene estas skribita lia nomo kaj de Eszter ‘Stela’ Besenyei)

Veronika Venislovas demandas pri financa raporto, kiam ĝi pretos.

Michael Boris Mandirola provas klarigi la situacion. Li parolis kun TEJO-kasisto Cédric Marchal, kiu eĉ donis intervjuon al Libera folio pri la temo. La bremsado estas, ke la Kasisto ne havas rektan aliron al la financoj. Laŭ la Regularo pri Kunlaboro inter UEA kaj TEJO, la Centra Oficejo disponigas al la kasisto de TEJO la aliron al la ĝisdatigita kontolibro de TEJO. Tamen komence de tiu ĉi monato, Cedric ankoraŭ nek ricevis la aliron nek definitivajn datumojn por fari la raporton.

Alexandre Raymond miras pri la situacio demandante, kiel tio povas esti akceptebla. Kial la Organizo havas aliron nek al financaj datumoj, nek aliron al la datumbazo de siaj membroj.

Rogier Huurman proponas pli ofte ĝeni UEAn per diverskanalaj memorigoj, se UEA ne plenumas la rajtojn.

Enric Baltasar rakontas, ke estos provo iom mildigi la problemon. La Estraro decidis krei propran aliĝilon por havi propran datumbazon.

Michael Boris Mandirola priskribas la situacion pri la Komerca ĉambro. En la komerca ĉambro nur la Ĝenerala Direktoro de TEJO estas enskribita kun memstara subskriborajto. En majo Osmo Buller emeritiĝis kaj la Estraro petis ke la prezidanto kaj la nova Ĝenerala Direktoro estu ambaŭ enskribitaj kun plena subskriborajto, sed nur la nova Ĝenerala Direktoro estis registrita por subskribi. La Estraro havas nur komunan rajton, tio signifas ke ĉiuj estraranoj devas kune subskribi la dokumentojn, kio apenaŭ eblas, ĉar ni loĝas en diversaj kontinentoj. Munir Abjiou, TEJO-oficisto, preparis dokumenton, por ke la TEJO-Prezidanto kaj Vicprezidanto povu subskribi. La Ĝenerala Direktoro tion ne subskribis malgraŭ la Estrara decido.

Alexandre Raymond demandas, kial tio okazas: ĉu tiu sinteno venas de la Ĝenerala Direktoro mem aŭ estas influo de alia flanko.

Michael Boris Mandirola klarigas ke la UEA-Prezidanto forte subtenas kaj defendas la Ĝeneralan Direktoron kaj ĝis nun la TEJO-Prezidanto ne sukcesis plene preparoli la temon kun UEA. Ekde sekvontsabate, la 22-an de aprilo 2017, okazos Estrarkunsido de UEA, kie ĉeestos la TEJO-Prezidanto ankaŭ por trakti tiun temon. Tio jam estas en la tagordo de la kunsido.

La Kunsidestro proponas fari triminutan paŭzon, ĉar la Komitato kunsidas pli ol 2 horojn kaj poste tamen ne deflankiĝi de la temo pri la Jarraporto. Dum tiu ĉi paŭzo la Propona komisino vortumas proponon pri la Jarraporto.

Post la malgranda paŭzo la Komitato revenas al la temo pri la Jarraporto. La ĉefa demando estas - ĉu voĉdoni pri la dokumento sen financa raporto.

Vít Guiglielmo Mišurec atentigas, ke Jarraporto ne estas parto de Financa raporto. Estas du apartaj dokumentoj, tial li ne vidas problemon voĉdoni nun.

La Komitato havas dubojn, ĉu indas mencii financan raporton en la Jarraporto, tial la Propona komisino proponas du vortumojn por voĉdono.

8.2. Voĉdono pri la Jarraporto kun mencio de la manko de la financa raporto

La propona komisiono prezentas la vortumon: *La komitato volas mencii la mankon de la financa raporto en la voĉdono pri la akcepto de la jarraporto.*

Rezultoj de la voĉdono (voĉdonos nur komitatanoj A kaj Ĉ)

Jes 8

Ne 9

Sindetenis 1

La voĉdono ne estas aprobita.

8.3. Voĉdono pri la Jarraporto sen mencii la mankon de la financa raporto

La propona komisiono prezentas la vortumon: *La komitato akceptas la jarraporton kaj ke etaj lingvaj korektoj poste estos farataj de la Ĝenerala Sekretario.*

Rezultoj de la voĉdono (voĉdonos nur komitatanoj A kaj Ĉ)

Jes 16

Ne 2

Sindetenis 0

La propono estas aprobita. La Jarraporto 2016 estas aprobita.

9. RILATOJ DE TEJO KAJ CO

9.1. Prezento de la problemo kaj diskuto

Michael Boris Mandirola rakontas, ke nuntempe estas problemoj kun CO, ĉefe temas pri plenumo de Regularo pri Kunlaboro inter UEA kaj TEJO. Kiel jam estis dirite, la Kasisto ne havas eblecon ĝiri monon, ne estas aliro al la datumbazo de TEJO-membroj, ne estas subskriborajto en la Komerca ĉambro. Lasttempe ofte se la Estraro petas ion gravan, tio prokrastiĝas je monatoj. La Prezidanto ne volis antaŭe tro publikigi la probleman situacion, esperante solvi ĝin pli facile en diskreteco sed tio ne realiĝis. Sed nun ŝajnas, ke la situacio transiris la limon. Okazas multaj prokrastoj kaj ne venas klarigoj pri tio. Tia malkonkorda situacio ankaŭ malbonas por la volontuloj, kiuj estas inter TEJO-Estraro kaj Ĝenerala Direktoro.

Enric Baltasar substrekas, ke UEA havas sufiĉe da povo super TEJO.

Ankaŭ kunlaboro inter Ĝenerala Direktoro kaj Ĝenerala Sekretario de TEJO nun estas minimuma kaj. Apenaŭ estas kunlaboro.

Jeremie Sabiyumva demandas, kiam komenciĝis tiuj problemoj kaj pro kio tio okazis.

Michael Boris Mandirola klarigas, ke la situacio malevoluis laŭgrade ekde pasinta somero.

Carlos Pesquera Alonso proponas tamen provi trovi iun bonan solvon por tiu ĉi problemo.

Enric Baltasar rimarkigas ke nuntempe la plej konsiderinda subteno flanke de UEA estas la pago de la defcito de Kontakto.

Michael Boris Mandirola strebos klarigi al la Estraro de UEA la situacion kaj kial ĝi estas tiom problema.

Alexandre Raymond proponas fari lastan averton al Ĝenerala Direktoro.

Rogier Huurman konsentas kaj aldonas, ke tio povas esti lasta afabla paŝo flanke al la Ĝenerala Direktoro kaj Centra Oficejo. Li pretas mem verki tiun ĉi peton: klare, firme kaj tamen diplomatie.

9.2. Voĉdono pri taskigo al la Estraro

La Propona komisiono prezentas la vortumon: *La komitato taskas la estraron uzi la sekvan eblon de la estrarkunsido de UEA por esprimi la malkontenton de la komitato pri la sinteno de la Ĝenerala Direktoro kaj provi trovi solvon valorigante la kunlaboron inter TEJO kaj UEA.*

Rezultoj de la voĉdono:

Jes 17

Ne 0

Sindetenis 4

La propono estas akceptita.

9.3. Verkado de rezolucio

Rogier Huurman krome proponas verki rezolucion, ke Komitato de TEJO subtenas la Estraron kaj la volontulojn en tiu ĉi situacio.

Carlos Pesquera Alonso esprimas sian dubon pri tiu vortumado, ĉar povas esti danĝere por la volontuloj.

Pierre Vittet, la volontulo de UEA kaj TEJO esprimas komunan deziron de la volontuloj - resti neŭtralaj.

Feriel Djenidi, TEJO-volontulino, konsentas, ke indas subteni la organizon ĝenerale, ne la volontulojn aparte.

Rogier Huurman intertempe preparis la rezolucian tekston kaj pretas prezenti ĝin: *La komitato de TEJO, kunvenanta en la Internacia Junulara Festivalo je la 16-a kaj 17-a de aprilo 2017, konstatante la valoron de daŭra kunlaboro inter UEA kaj TEJO, konstatante diversajn problemojn en la kunlaborado inter la estraro kaj aliaj reprezentantoj de TEJO unuflanke, kaj la estraro kaj Ĝenerala Direktoro de UEA aliflanke, petas, ke UEA kaj ĝia Ĝenerala Direktoro respektu la Regularon pri Kunlaboro inter UEA kaj TEJO sen esceptoj, kaj ke la estraroj de TEJO kaj UEA strebu solvi la estantajn problemojn sen ajna prokrasto.*

9.4. Voĉdono pri la proponita vortumo de la Rezolucio

Rezultoj de la voĉdono:

Jes 18

Ne 0

Sindetenis 3

La propono estas aprobita.

10. CETERAĴOJ

La komitatano A de ĈEJ Vít Guiglielmo Mišurec havas kelkajn demandojn:

1. ĉu eblus fari iam komunan komitatkunsidon de TEJO kaj UEA? La TEJO-prezidanto konsentas, ke tio povus esti interese, sed la propono estas logistike malfacilega, ĉar la UEA-Komitato kunsidas dum UK. Fari apartan kunsidon por ĉiuj komitatanoj eksterkadre de UK tre komplikas.

2. kie la Komitato povas trovi ĉiujn kontraktojn de TEJO?

Michael Boris Mandirola respondas, ke ne estas tia kontraktujo kaj povas disponigi ekzistantajn kontraktojn laŭpete.

Carlos Pesquera Alonso ŝatus havi trejnadon rilate al kreado de videomaterialoj.

Michael Boris Mandorila proponas memori tiun ideon por venontaj limdatoj de Erasmus+.

Ankaŭ Carlos Pesquera Alonso konstatas, ke multaj homoj ne konas BEMI-n. Tial li petas, ke aliaj komitatanoj disvastigu la informon pri la organizo.

11. FERMO

La kunsidestro dankas ĉiujn partoprenintojn. La kunsido finiĝis je la 01.05 la 17-an de aprilo 2017.

ĈEESTANTAJ KOMITATANOJ

	Nomo, organizo	Komitatanoj	Anstataŭanto
1	Bernard Gnancadja (BOJE)	Kom. A	
2	Querino Neto (BEJO)	Kom. A	Alexandre Raymond
3	Gilbert Niyukuri (JEBUO)	Kom. A	Jeremie Sabiyumva
4	Vít Guiglielmo Mišurec (ĈEJ)	Kom. A	
5	Michaela Stegmaier (GEJ)	Kom. A	Charlotte Larsson
6	Charlotte Larsson (GEJ)	Kom. A	
7	Veronika Venislovas (HEJ)	Kom. A	
8	Hamed Sufi (IREJO)	Kom. A	Joop Kiefte
9	Emanuele Regano (IEJ)	Kom. A	
10	Walter Bruno (KEJ)	Kom. A	Emanuele Regano
11	Eddy Onan (DKEJO)	Kom. A	Cyprien Guiya
12	Robin van der Vliet (NEJ)	Kom. A	Rogier Hurman
13	Tobiasz Kubisiowski (PEJ)	Kom. A	Veronika Venislovas
14	Kirill Noviĉenko (REJM)	Kom. A	Vít Guiglielmo MIŠUREC
15	Tomáš Stano (SKEJ)	Kom. A	
16	Carlos Pesquera Alonso (BEMI)	Kom. A	
17	Alexandre Raymond (EUROKKA)	Kom. A	
18	Joop Kiefte	Kom. Ĉ	

TAGORDO

1. Malfermo
2. Eventuala elekto de prezidanto de la Komitato
3. Proponoj pri:
 - 3.1. Voĉdona Komisiono
 - 3.2. Propona Komisiono
 - 3.3. Kontrolo de la kvorumo
4. Fikso de cetera tagordo
5. Raciigi la estraranecan periodon al la vivo de junuloj
6. Aliaj reglamentaj ŝanĝoj
7. Jura memstariĝo de TEJO
8. Jarraporto 2016
9. Rilatoj inter TEJO kaj la CO
10. Ceteraĵoj
11. Fermo

STATUTO DE TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

ĈAPITRO 1

CELOJ KAJ AGADO

1. Establo

- (1) TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO (ekde nun en la Statuto: TEJO) estas per tiu ĉi statuto establita kiel asocio.
- (2) TEJO havas sian sidejon en Rotterdam, Nederlando.
- (3) TEJO estas establita por nedifinita daŭro.
- (4) TEJO ne estas profitocela organizo.
- (5) TEJO ne disdonas profiton inter siaj membroj.
- (6) Kalendaraj aludoj estas interpretendaj laŭ la gregoria kalendaro, kaj la librotena jaro estas de la 1-a de januaro ĝis la 31-a de decembro.

2. Junulara sekcio de UEA

- (1) TEJO estas la junulara sekcio de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO ("UEA"), internacia organizo ekzistanta kun jura personeco laŭ la leĝoj de Nederlando.

3. Celoj

La celoj de TEJO estas:

- (i) disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto;
- (ii) kontribui al la evoluo de la Esperanta kulturo;
- (iii) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;

- (iv) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sendepende de diferencoj rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
- (v) helpi la junularon havi aktivan rolon en konstruo de socio inkluziva, internacia, interkompreniĝa kaj rajtrespekta;
- (vi) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, disvolvante ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj;
- (vii) plibonigi la konojn kaj organizajn kapablojn de siaj aktivuloj kaj instigi ilian kulturen evoluon; kaj
- (viii) liveradi junajn fortojn al la Esperanta movado.

4. Agado

- (1) TEJO aplikas en sia agado metodojn, kiuj respondas al la interesoj de la junularo.
- (2) La agado de TEJO konsistas precipe el:
 - (i) informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto;
 - (ii) praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj;
 - (iii) okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj; kaj
 - (iv) instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.

ĈAPITRO 2

AGADPRINCIPOJ

5. Neŭtraleco

- (1) TEJO kontraŭas diskriminacion rilate al nacieco, raso, sekso, seksa orientiĝo, handikapeco, religio, politiko, socia deveno kaj lingvo.
- (2) TEJO estas sendependa de ĉiu ajn partio.
- (3) TEJO estas neŭtrala pri aferoj nerilataj al ĝiaj celoj.

6. Esencaj kondiĉoj

Por la agado de TEJO esencaj kondiĉoj estas:

- (i) bonaj internaciaj rilatoj; kaj
- (ii) respekto de la homaj rajtoj tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj.

7. Lingvo

La sola oficiala lingvo de TEJO estas la internacia lingvo Esperanto tia, kia ĝi estas difini ta de:

- (i) sia Fundamento,
- (ii) la verkaro de sia iniciatinto Ludoviko Zamenhof; kaj
- (iii) la ĝenerala lingva uzado sub kontrolo de la Akademio de Esperanto.

ĈAPITRO 3

LANDAJ KAJ FAKAJ SEKCIOJ

8. Landaj sekcioj

(1) TEJO instigas al junaj uzantoj de Esperanto en ĉiu lando formi sin en organizon por aliĝi al TEJO kiel landa sekcio.

(2) La minimumaj kriterioj por landa sekcio estas jenaj:

- (i) ĝi kunigas tra sia lando junajn uzantojn de Esperanto;
- (ii) ĝi subtenas la celojn de TEJO;
- (iii) ĝi estas aŭ aparta asocio aŭ integra parto de landa asocio aliĝinta al UEA;
- (iv) ĝi estas laŭorde organizita;
- (v) ĝi estas vaste malfermita al junuloj, sen ekskluzivoj pro nacieco, enlanda loĝloko, raso, sekso, seksa orientiĝo, handikapeco, religio, politiko, socia deveno aŭ lingvo;

(vi) membreco en ĝi estas libervola; kaj

(vii) ĝi estas demokratie gvidata.

(viii) havas almenaŭ 3 kalkuleblajn membrojn

(3) Krom en esceptaj kazoj, TEJO ne havas pli ol 1 landan sekcion en ĉiu lando. Pri esceptaj kazoj decidas la Komitato.

9. Fakaj sekcioj

(1) TEJO instigas al junaj uzantoj de Esperanto, kiuj interesiĝas pri aparta fako, formi sin en organizon por aliĝi al TEJO kiel faka sekcio.

(2) La minimumaj kriterioj por faka sekcio estas jenaj:

(i) ĝi kunigas tra la mondo junajn uzantojn de Esperanto, kiuj interesiĝas pri la koncerna fako;

(ii) ĝi estas simpatia al la celoj de TEJO;

(iii) ĝi estas aŭ aparta asocio aŭ integra parto de faka asocio aliĝinta al UEA;

(iv) ĝi estas laŭorde organizita;

(v) ĝi estas vaste malfermita al junuloj, sen ekskluzivoj pro nacieco, loĝloko, raso, sekso, seksa orientiĝo, handikapeco, religio, politiko, socia deveno aŭ lingvo;

(vi) membreco en ĝi estas libervola; kaj

(vii) ĝi estas demokratie gvidata.

(viii) havas almenaŭ 3 kalkuleblajn membrojn

(3) Krom en esceptaj kazoj, TEJO ne havas pli ol 1 fakan sekcion por ĉiu fako. Pri esceptaj kazoj decidas la Komitato.

ĈAPITRO 4

MEMBROJ

10. Membroj

(1) La individuaj membroj estas:

(i) la individuaj membroj de UEA, kiuj aĝas ne pli ol 35 jarojn je la komenco de la jaro.

(2) La aligitaj membroj estas:

(i) la aligitaj membroj de UEA, kiuj aĝas ne pli ol 35 jarojn je la komenco de la jaro.

(3) La asociaj membroj estas la membroj de la unuopaj landaj aŭ fakaj sekcioj:

(i) kiuj aĝas ĝis inkluzive 35 jarojn je la komenco de la jaro;

(ii) kiuj ne estas individuaj aŭ aligitaj membroj; kaj

(iii) por kiuj la koncerna landa aŭ faka sekcio pagis kotizon egalan al la kotizo por aligita membreco de UEA.

(4) La Junaj Amikoj de Esperanto estas membroj:

(i) kiuj aĝas ĝis inkluzive 35 jarojn je la komenco de la jaro;

(ii) kiuj ne estas individuaj, asociaj aŭ aligitaj membroj; kaj

(a) deklaras sian volon iĝi juna amiko de Esperanto; aŭ

(b) estas membroj de la unuopaj landaj aŭ fakaj asocioj por kiuj:

A. la koncerna landa aŭ faka sekcio ne pagas kotizon al TEJO

B. la koncerna landa aŭ faka sekcio ne ricevas kotizon.

(5) La membreco estas persona kaj ne transdonebla.

(6) La membreco finiĝas:

(i) Je komenco de nova jaro, post kiam eksvalidiĝas unu el la kondiĉoj kiuj difinas membrecon;

(ii) Post peto de la membro;

(iii) Je morto de la membro.

(7) La Estraro havas la registron de la nomo kaj adresoj de ĉiuj individuaj membroj, de ĉiuj Junaj Amikoj de Esperanto kaj de ĉiuj landaj kaj fakaj sekcioj.

11. Patronoj kaj honoritoj

(1) La Patronoj estas tiuj, kiuj kontribuis al la financoj de TEJO laŭ kriterioj de TEJO difinitaj.

(2) La honoritoj estas la Honoraj Prezidantoj kaj Honoraj Membroj elektitaj de TEJO.

12. Eksigo

1. Aliĝinta asocio aŭ individua membro, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de TEJO, morale aŭ materie damaĝas ĝin, aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al ĝi aŭ la minimumajn kriteriojn laŭ la ĉapitro 3, povas esti eksigita el TEJO.
2. Estas kompetentaj la Estraroj de UEA kaj de TEJO kune pri la eksigo de individuaj membroj, kaj la Komitato de TEJO pri la eksigo de aliĝintaj asocioj, patronoj kaj honoritoj de TEJO.
3. Individuaj membroj eksigitaj de la Estraroj rajtas apelacii al la Komitato de UEA kaj al la Komitato de TEJO.
4. Post dujara nemembreco aŭ post nuligo de la eksigdecido fare da la Komitato de TEJO, eksigita asocio rajtas peti permeson denove aliĝi. Pri tio decidas la Komitato de TEJO.
5. Post dujara nemembreco aŭ post nuligo de la eksigdecido fare da la Komitatoj de TEJO kaj UEA, eksigita individua membro, rajtas peti permeson denove ali ĝi. Pri tio decidas la Komitatoj de TEJO kaj UEA.

ĈAPITRO 5

ORGANOJ KAJ REPRESENTADO

13. Ĉefaj organoj

(1) La ĉefaj organoj estas la Komitato kaj la Estraro.

(2) La Komitato konsistas el:

- (i) la komitatanoj A, nomumitaj de la unuopaj sekcioj;
- (ii) la komitatanoj B, elektitaj de la individuaj membroj;
- (iii) la komitatanoj C, elektitaj de la Junaj Amikoj de Esperanto;
- (iv) la komitatanoj Ĉ, elektitaj de la komitatanoj A, B kaj C;
- (v) la estraranoj.

(3) La Estraro konsistas el maksimume 9 estraranoj, inter kiuj estas la Prezidanto, la Ĝenerala Sekretario, la Kasisto kaj unu ĝis tri Vicprezidantoj.

(4) La estraranoj estas elektitaj por difinita mandato (aŭ malelektitaj) de la komitatanoj A, B, C kaj Ĉ. Detalan proceduron difinas Ĝenerala Reglamento.

(5) La anoj de la ĉefaj organoj aĝas almenaŭ 18 jarojn en la tago en kiu ili estas nomumitaj aŭ elektitaj.

(6) Neniu rajtas esti nomumita aŭ elektita al la ĉefaj organoj, se tiu fariĝos 36-jaraĝa (aŭ pli) dum sia mandato.

(7) Prezidanto ne rajtas ofici dum pli ol du sinsekvaj oficperiodoj kaj je la fino de la dua oficperiodo devas retiriĝi el la prezidanteco por almenaŭ unu oficperiodo.

(8) La voĉdonoj en la ĉefaj organoj povas okazi persone dum kunsidoj aŭ maldumkunside per letero, retpoŝto, aŭ tra ajna alia aktuala komunikadmaniero, ĉu elektronike, ĉu papere, kondiĉe ke la identeco de la sendinto kun sufiĉa sekureco povas esti establita.

(9) Estraraneco povas finiĝi en iu ajn momento:

- (i) per ekŝigo, skribe komunikita al la Prezidanto, Ĝenerala Sekretario, aŭ Ĝenerala Direktoro;
- (ii) per eksigo fare de la Komitato de TEJO.

14. Re prezentado

(1) TEJO reprezentas la Prezidanto en juraj kaj nejuraj aferoj kaj subskribas la ĉefajn dokumentojn.

(2) La Vicprezidantoj laŭbezzone anstataŭas la Prezidanton.

(3) La Estraro povas nomumi reprezentanton, kiu reprezentas TEJOn ene de limoj difinitaj en la nomumo.

15. Asembleo

(1) La asembleo (ĝenerala membrokunveno) de TEJO estas la kunsido de la Komitato.

(2) La kunsidon de la Komitato kunvokas skribe la Ĝenerala Sekretario de TEJO almenaŭ 28 tagojn antaŭ la komenco de la kunsido.

(3) Ĉiu membro de TEJO elektas sian reprezentanton en la Komitato laŭ demokratia maniero.

(4) La Reglamento de TEJO difinas la proceduron de la elekto de la Komitato.

ĈAPITRO 6

STATUTŜANĜOJ

16. Amendo

(1) Se la amendpropono koncernas artikolojn kiuj difinas la rilaton kun UEA, la amendon devas aprobi kaj la Komitato de TEJO kaj la Komitato de UEA.

(2) Aliajn amendojn povas aprobi la Komitato de TEJO, ordinaire post konsultado kun la Estraro de UEA.

(3) La Komitato traktas amendon nur se:

(i) En la alvoko al kunsido de la Komitato estis anoncita statuta amendpropono;

(ii) Unu semajnon antaŭ la kunsido la teksto de la amendpropono estis taŭge disponigita al la Komitato;

(4) Amendpropono estas aprobita de la Komitato nur se:

(i) (a) Almenaŭ du trionoj de la ĉeestaj komitatanoj voĉdonas favore al la propono, kaj krome

(b) la ĉeestaj komitatanoj reprezentas almenaŭ duonon de la Komitato; aŭ

(ii) Almenaŭ duono de la Komitato voĉdonas favore al la propono.

ĈAPITRO 7

MALFONDO

17. Decido pri malfondo

(1) Pri malfondo de TEJO povas decidi nur la Komitato.

(2) La Komitato traktas proponon pri malfondo de TEJO same kiel proponon pri amendo de la statuto.

(3) Tiun decidon devas akompani starigo de komisiono de likvidantoj. La komisiono de likvidantoj likvidas la kurantajn aferojn de la Asocio, disponigas rimedojn por kovri eventualan deficiton, donas la eventuale restantajn havaĵojn al Universala Esperanto-Asocio, aŭ kaze ke tio neniel eblas, al alia neprofitcela organizo kun similaj celoj, zorgas pri la libroj kaj arĥivoj de la malfondita TEJO. La malfondo devas sekvi la priskribojn de la unua Titolo de la dua Libro de la nederlanda Civila Kodo.